

PUBLIKA PREZENTADO DE BOHEMIAJ LUMOJ

La traduko al Esperanto de la verko de Ramón M^a del Valle-Inclán, "Bohemias Lumoj" estos prezentata publike dum tiu ĉi monato, en tre altira loko: la teatrejo Kubik Fabrik.

La dato estos la sabato, 19a de marto, je la 18 horo, kaj la aliro estos senpaga (MEL mem zorgos pri la luado de la spaco).

La teatra spaco Kubik situas en la kvartalo Usera, en la strato Primitiva Gañán, numero 5, de Madrid (metrostacio Plaza Elíptica).

Ĝi estas spaco alternativa, moderna, malgranda kaj jam iel mita en la historio de la nuntempa teatro en Madrido.

La aranĝo konsistos el prezento de la libro kaj aktorita leg-prezentado de ĝia dek-dua sceno.

Diskonigu inter viaj amikoj, amantoj de kulturo, precipe inter ne esperantistoj, ĉar la prezentado meritos la penon.

VENONTA PAROLADO EN MEZLERNEJO

Esperanto estos prezentata la venontan 15-an de marto, ene de la kultura semajno de la lernejo San Luis Gonzaga, de Majadahonda.

Se vi pretas kunlabori en la prezentado, bv. kontakti la adreson de Liceo aŭ de la redakto.

NOVA ASPEKTO DE NIA RETEJO

La retejo de Madrida Esperanto-Liceo estis translokigita en tiu ĉi pasinta monato al nova servilo, pli sekura, kaj oni profitis la okazon por ĝin refasoni.

Vi povas viziti ĝin en la konstanta adreso <http://esperanto.es/mel/>. Atentu tamen ke la malnovaj longaj adresoj de ĉiu aparta paĝo ne plu samas, kaj do se vi zorgas pri iu retejo kun ligiloj al la paĝaro, ni rekomendas ŝanĝi ilin al la novaj adresoj, pli mallongaj kaj logikaj.

ALIĜO AL LA LICEO, JARO 2016

En la sekcio "Dokumentoj" de nia retejo troviĝas la aliĝilo al MEL por la jaro 2016 <http://esperanto.es/mel/index.php/dokumentoj-documentos>. Se vi ankoraŭ ne estas ano de Madrida Esperanto-Liceo, sufiĉas plenigi la formularon, kun via nomo, adreso, telefonnumero kaj retadreso, kaj sendi al la adreso de MEL madrid@esperanto.es.

La kotizo estas nur 12 € jare. Oni povas pagi rekte en la sidejo, aŭ sendi la monon per banka transpago, al la konto de la banko *ARQUIA - Caja de Arquitectos*, kontokodo IBAN: ES66 3183 2800 1700 0132 8957.

Aliĝu al nia aktivado!



Luces de bohemia

en el idioma esperanto

Se ha publicado la traducción al esperanto de la genial obra de Ramón del Valle-Inclán. El traductor, Miguel Fernández Martín, reconocido poeta en esperanto, presentará el libro y a continuación se realizará la lectura de la escena duodécima en la sala:




Kubik Fabrik
C/ Primitiva Gañán 5, Madrid
sábado, 19 de marzo a las 6 de la tarde
(entrada libre hasta completar aforo)



KUNVENADO DE LA ESTRARO DE MEL

Kiel ni jam informis en pasinta numeo, dum la ĝenerala kunsido de MEL oni aprobis la nomumon de nova kasisto, Jaime Vinielles de Pereda. Jen foto de la estraro, dum ceremonio de subskribo de la novaj rajtigaj dokumentoj.

**HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO**

Forte progresas la pretigo de la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Herrera del Duque (Ekstremaduro), inter la 30 de junio kaj 4 de julio 2016, kaj kun granda sukceso en la partopreno: jam 120 homoj aliĝis, kiam ankoraŭ mankas kvar monatoj. Estis anoncita ankaŭ la okazigo de Seminario por Aktivula Maturiĝo *AMO-Seminario*, sponsorita de UEA iom antaŭe kaj parte koincide kun la Kongreso, de post la 29-a de junio. Madrido kunrolos en la antaŭkongresa programo, per la organizado de kultura vojo, sur la spuroj de Bohemiaj Lumoj, por la vespero de la 28-a de junio.

En venontaj numeroj ni precizigos ĉiujn detalojn, sed dume eblas koni la novaĵojn en la paĝo de la kongreso <http://www.esperanto.es/kongreso>, kie ankaŭ troviĝas la aliĝilo. Por ĉiuj duboj kaj krominformoj, skribu al la adreso kongreso@esperanto.es.

KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30.

La sabata renkontiĝo okazos ĉifoje dimanĉe la 6-an de marto. Atentu la forumojn por koni detalojn, sed probable ni renkontiĝos post la 6-a, en kafejo Indalo Tapas Chueca, strato Pérez Galdós, 7 (metrostacio Chueca aŭ Gran Vía).

Memoru: por esti informitaj pri la novaĵoj de la movado en Madrido, vizitu regule retejon <http://www.esperanto.es/mel> kaj liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com